



ARTAJ KONfrontoj en ESperanto, Poznań 23 - 25 IX 2011

Ĝeneralaj informoj

ARKONES estas sendependa arta kaj kultura forumo organizata fare de membroj de E-SENCO Kultura-Socia Societo al Ludoviko Zamenhof kaj sub aŭspicoj de TEJO.

Utilaj informoj:

Kontaktotelefonoj:

Paweł Janowczyk +48 (602) 28 32 42

Tobiasz Kaźmierski +48 (509) 40 03 17

Taksioj: Se vi vokas radiotaksikompanion RMI: +48 (61) 821 92 19 kaj uzas kodon AK-98 por la nomo Paweł Janowczyk vi veturos malmultekoste.

Biletoj: "kvaronhora": 3,00 zł, "duonhora": 4,00 zł validaj por tramoj kaj busoj. Por buslinio "L" al la flughaveno: 4,40 zł. La biletoj aĉetebblas en kioskoj. Vojaĝemuloj en la fervoja stacidomo povas aĉeti "diurnan": 12,00 zł, "2-diurnan": 16,00 zł aŭ "3-diurnan": 20,00 zł biletojn, kiuj konsiderinde malaltigas kostojn.

Gravaj adresoj:

ARKONESejo: aleo Niepodległości 8a

Studenta Domo "Jowita": strato Zwierzyniecka 7 (ĉe la Rondo Kaponiera)

Forirante el viaj ĉambroj bonvolu ĉiam lasi ŝlosilojn ĉe la hotela/studentdoma akceptejo!!!

Manĝeblecoj:

En la ARKONESejo funkcios bufedo (trinkaĵoj kaj rapidaj manĝaĵoj).

Programo

Vendredo (2011-09-23)

16:00 Ekfunkcio de la akceptejo kaj programo.

17:00 Malfermo de la libroservo.

17:00 Veronika Poór, Rogier Huurman – Mojoseco kaj muziko: Muzaiko! (Biblioteko)

17:00 Ian Fantom – Ĉu multkulturismo eblas? (Kunsidejo)

18:00 Peter Baláz – E@I – novaj planoj kaj projektoj. (Biblioteko)

18:30 Kurso de Esperanto. (Kunsidejo) **fermita por la publiko!**

19:00 Katalin Kováts – Stelsemantoj en la ora nordo – T. Morariu kaj aliaj Cseh-instruistoj. (Biblioteko)

19:20 Przemysław Wierzbowski – Evoluo de la bjalistoka e-movado. (Kunsidejo)

20:00 Oficiala inaŭguro kaj la inaŭgura koncerto de SoloTronik. (Spegulejo)

poste Dancejo – gvidas Aleksej Korĵenkov.

Sabato (2011-09-24)

09:00 Tomasz Chmielik – Kantoj de Mordehaj Gebirtig en Esperanto. (Biblioteko)

10:00 Yves Nevelsteen – Komputeko – prikomputilaj vortoj en Esperanto. (Biblioteko)

10:00 John Wells – Lingvoj en mia vivo. (Spegulejo)

11:00 Lu Wunsch-Rolshoven – Varbado bezonas ripetadon. (Biblioteko)

11:00 Jerzy Rządcki – Lingvo de l' kor'. Dankemo – vojo al feliĉo. (Kunsidejo)

12:00 Felix Zesch - Prezento de la lingvopolitikaj gvidlinioj de la Germana Esperanto-Asocio. (Biblioteko)

12:00 Aleksandro Melnikov – Ĉu vi estas normalulo aŭ... Esperantisto? Testeto kun komentoj. (Kunsidejo)

12:00 Kurso de Esperanto. (Kunsidejo) – **fermita por la publiko!**

- 13:00 Roman Dobrzyński – Prezento de la filmo “Japana printempo”, prelego pri Oomoto. (Biblioteko)
- 13:00 Russ Williams – La ludo Dixit kaj aliaj sociaj/festaj ludoj. (Kunsiedejo)
- 14:00 Radosław Nowakowski – Prezento de propraj libroj-instalaĵoj. (Spegulejo)
- 14:00 Katalin Kováts – RITE kaj novaĵoj de edukado.net. (Biblioteko)
- 15:00 Radosław Nowakowski – Prezento de la nova projekto Liberolando. (Spegulejo)
- 15:00 Katalin Kováts – Ni jam estas 500-ope! Raporto pri la sukceso de la KER-sistemo. (Biblioteko)
- 15:00 Tomasz Chmielik, Robert Kamiński – Stato kaj perspektivoj de la instruado de Esperanto en Pollando. (Kunsiedejo)
- 16:00 Jarlo Martelmonto “AL, SUB, APUDE”. (Spegulejo)
- 16:00 Peter Baláž – Lingvo-lernado rete (lernu.net , slovake.eu , espa2.eu , Livemocha ktp.). (Biblioteko)
- 16:20 Prezento de la filmo “La universala lingvo” de Sam Green. (Spegulejo)
- 16:50 Komuna foto de ĉiuj partoprenantoj. (en la apuda parko)
- 17:20 Renkontiĝo kun Varsovia Vento. (Biblioteko)
- 17:20 Tomasz Chmielik – “Pola Esperantisto” havas 105 jarojn. (Kunsiedejo)
- 18:00 Barbara Pietrzak - Podkasto, Pola retRadio, parola kulturo de Esperanto. (Biblioteko)
- 18:00 Lidia Ligeza – La popola magio de amo. (Kunsiedejo)
- 19:00 Tradicia Miela Vespero. (Spegulejo)
- 20:00 Tamburatorio – Monodrumo de Radosław Nowakowski. (Spegulejo)
- 21:00 “Kato Koloro” – teatra elpaŝo de bjalistoka junularo. (Spegulejo)
- 22:00 Reĉitalo de Zuzanna Kornicka. (Spegulejo)
- 23:00 Dancejo – gvidas Aleksej Korĵenkov. (Spegulejo)

Dimanĉo (2011-09-25)

- 09:00 Tomasz Chmielik – “Mia Stelo” – pri la libro de Felicja Raszkin-Nowak. (Biblioteko)
- 09:00 Jefim Zajdman – Raul Wallenberg, forgesitaj E-pioniroj kaj sekretaj servoj. (Kunsiedejo)
- 10:00 Ryszard Rokicki - Akcento en kunmetitaj vortoj. (Biblioteko)
- 10:00 Zsófia Kóródy - Projekto PUNTO en Esperanto-Urbo. (Kunsiedejo)
- 11:00 Teatro “Improviso”. (Spegulejo)
- 11:00 Edmond Plutniak – Vojaĝo al la UK en Jokohamo per la Transsiberia Trajno. (Biblioteko)
- 11:00 Johano Pachter – 125 jaroj de kontaktoj inter germanaj kaj polaj Esperantistoj. (Kunsiedejo)
- 12:00 Koncerto de Anjo Amika. (Spegulejo)
- 12:00 Prezento de la filmo Polaj spuroj de Rogener Pavinski. (Biblioteko)
- 12:00 Kurso de Esperanto. (Kunsiedejo) – **fermita por la publiko!**
- 13:00 Prezentiĝo de Esperanto-eldonejoj, gazetoj kaj radioj. (Biblioteko)
- 13:40 Prezentiĝo de Esperanto-aranĝoj. (Biblioteko)
- 14:00 Russ Williams – Abstraktaj strategiaj ludoj. (Biblioteko)

Spektakloj kaj koncertoj

Resumoj

Pri enhavo de materialoj, kiujn organizantoj ricevis por distribui al partoprenantoj, respondecas iliaj aŭtoroj. Organizanto de ARKONES - Societo E-SENCO - estas jura posedanto de kopirajtoj de ĉiuj registrataj vidaj kaj sonaj materialoj. Plena regularo de la aranĝo troveblas ĉe la retejo www.arkones.org.

Tamburatorio

Radosław Nowakowski, tamburisto de la grupo Osjan, prezentas:

Titolo: Monodrumo

Mi tamburas alie, malsimile al ĉiuj. Mia tamburado baziĝas sur la plej fundamentaj, universalaj kaj senstilaj eroj kaj tial ĝi ne radikigiĝas en iu-ajn tradicio. Ĝi estas tia kia estas mi kaj la loko kie mi naskiĝis kaj vivas – malgrandaj kaj ege maljunaj montoj de tempo nememora nomitaj Montoj Kalvaj.

Sola koncerto povas esti nur demonstrado de virtuozececo. Tamen ĝi povas esti ankaŭ rakontado. “Monodrumo” estas la rakonto rakontata de ses tamburoj kaj unu homo. Rakontata je la lingvo de ritmoj, sonoj, tonoj, batoj, frapoj, tuŝoj, vibradoj, tremoj, bruoj, kontrastoj, haltoj, paŭzoj, fulmoj, muĝoj, silentoj, tremoloj,

frotoj, susuroj ... la lingvo plej simpla kaj plej abstrakta. Preskaŭ unuhora rakonto, kiun ĉiu kapablas deĉifri siamaniere.

Kaj ne povas esti alie. En mia kazo. Ĉar mi neniam ekaŭdos mian propran muzikon, mi neniam imagos mian grupon aŭ orkestron, mi neniam komponos simfonion aŭ eĉ kanton. Sed same kiel min terurigas komponi iun melodion, aliulon terurigas verki iun tekston. Kaj same kiel aliulon ne terurigas komponi muzikon ekzemple por iu spektaklo, min ne terurigas verki tutan libron. Kvankam la vorto "terurigi" ne estas ĉi tie la vorto konvena. Tamen kiu vorto estus konvena?

Titolo: Prezento de la nova projekto Liberolando.

Jen mia ŝtato. Mia lando. Nek demokratio. Nek reĝlando. La reĝimo hiperteksta. La ŝtato senĉese kaj senfine konstruata. La libro komenciĝanta enmeze kaj disvastiĝanta, progresanta ĉiudirekten. La libera libro por liberaj legantoj. La lando kiun oni povas viziti elspezante preskaŭ nenion, pagante nur iom da tempo perdota por legado - nu, oni eble eĉ povus enspezi iomete, ja oni povus fari dum tiom da tempo ion pli nenepuran, pli nenecesan kaj pli nebezonatan.

Titolo: Prezento de propraj libroj-instalaĵoj.

Dum la prezento la aŭtoro lanĉos sian novan libron-instalaĵon "Malsignoj". Tio estontis iu laŭvica, kvankam eble la lasta, verkaĵo pri ege interesaj rilatoj inter vortoj kaj imagaĵoj/desegnaĵoj/bildoj, iu rakonto pri tio kio superas kaj kio subas, pri senĉesa militado unu kontraŭ alia. Tio estontis iuspeca lingvistika aŭ eble semiologia disertacio. Tamen fine ĝi okazis tute nekutima rakonto pri vojo. Pri la vojaĝo oni ne scias de kie kaj kien. Nenio pli bona povis al mi okazi.

Anjo Amika

Mi komencis kanti en Esperanto, en 1984, en Pisanica, okaze de Internacia Ĥora Renkontiĝo. Tiam mi ricevis ne priskribeblian belan travivaĵon.

Poste, en 1987, dum UK, mi kantis en la programero "Ni serĉas talentojn". En tiu aranĝo, mi gajnis la unuan premion.

Sekvis 1992, UK en Vieno, kie debutis mia "Por vidi la mondon" kasedo, kun granda sukceso. En 1993, donis koncerton en Alcludio (Palma de Majoroko); 1994, en Bratislavo, 1995 en Gdansko, mi donis koncertojn.

En Napolo sekvis recitalo, en 1997.

Do, ĉiujare mi havis eblecon kanti en Eo. En 2007, mi partoprenis ARKONES, dum kiu danke al la organizantoj, mi kaj kantis, kaj partoprenis la oratoran konkurson, kiun mi gajnis.

Teatro "Improviso"

Jalta Esperanto-teatro "Improviso" prezentos unuaktajn spektaklojn laŭ rakontoj de A.Ĉeĥov ("Masko", "Dramo", "Longa" "Lango") kaj N.Gogol ("Edziniĝo").

Fama rusa verkisto Anton Ĉeĥov loĝis en Jalto, kie estas lia vilao- muzeo kaj ĉiujare okazas internaciaj teatraj festivaloj, dediĉitaj al lia memoro.

Estas simbole, ke teatro "Improviso" aperis ĝuste en Jalto, ĉar la unuan artikolon pri neceso de E-teatro verkis en 1891 jaro fama E-pioniro, "patro" de originalaj E-noveloj Nikolaj Borovko, fondinto kaj unua direktoro de jalta urba biblioteko.

Arta gvidanto de la teatro estas profesia reĝisoro Svetlana Kravcova. Dum tri jaroj de la ekzisto la teatro prezentis spektaklojn en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj en Ukrainio, Pollando, Slovakio, Germanio, ankaŭ en ARKONES en 2008 jaro. Survoje al Poznano la teatro planas spektakli en la Zamenhof-centro en Bjalistoko.

"Kato Koloro"

Teatra elpaŝo de bjalistoka junularo.

Moises Gutierrez Raimundez venis el Madrido en la 7an liceon kadre de Lingva Asistado en la programo Comenius. Li gvidis lecionojn de la angla kaj hispana kaj partoprenis en desegnado-ekzercoj en artaj klasoj.

"Kato Koloro" naskiĝis en lia koro. La kato sian vagadon komencis per vizitado de ĉiuj artaj klasoj. La tieaj lernantoj ilustradis lian historion kaj junaj aktoroj prezentadis la rakonton per gestoj kaj movoj. Sekve lingvistoj tradukis la historion al de ili konataj fremdaj lingvoj kaj la kato ekvagis en la mondon. Li atingis la Centron Ludoviko Zamenhof kaj poste, pere de la Fondaĵo de Universitato en Bjalistoko li renkontis plurajn lernantojn kaj instruistojn en Podlaĥio. Kie ajn li aperis, li kortuŝis, ravis, kaj pensigis.

Fine li lernis Esperanton kaj povis vere ekvivi. Danke al helpo de Bjalistoka Esperanto-Societo forveturis li al aliaj landoj. Akompanite de okulkuracisto Ludoviko Zamenhof, aŭtoro de la universala lingvo Esperanto, la kato povas vagadi malproksimen. Kien, laŭ vi? Ĝi jam vizitis la 96-an UK-on en Kopenhago kaj nun kiel teatraĵo alvenas Poznanon por partopreni ARKONES-on.

Zuzanna Kornicka

Ekde ŝia naskiĝo mondo de la plej buntspecaj sonoj estis al ŝi tre proksima. Fine senesperigintaj gepatroj aĉetis por ŝi unuan gitaron kaj de tiam ekregis kvieto, ĉar ŝi bruegas eksterhejme en preĝejoj kaj diversaj aranĝoj kaj eĉ invitas ŝin tiucele homoj el aliaj landoj.

Jarlo Martelmonto

Modernisma poeto kaj artisto. Li verkas en sveda kaj Esperanto. La poemoj estas ne nur vortpoemoj, sed grandparte senvortaj bildpoemoj. Tio estas tendenco, kiu lokiĝas inter dadaisma kaj konkreta poezio.

Solotronik

Solotronik - hispana muzikisto - prezentas sian lastan albumon. Malnovaj kanzonoj de siaj malnovaj bandoj Lokotomota Keromnes kaj Ribbentrop Faktorio estis apogitaj en la 80-aj jaroj per gravuloj de la hispana arta medio, precipe Pedro Almodovar kaj Antonio Banderas. Tiu repertuaro estis adaptita al Esperanto kaj al novaj tendencoj en la sona arto de la 21-a jarcento.

Per muzikaj stiloj: elektra, drumo kaj baso, danco, muziko ambienta, ktp. plus klasika opero; chio miksigita per flamenka rekantaĵo kaj ritmadroj. Krome, sur ekrano vi povos vidi la bildojn ligitaj kun tiaj kanzonoj.

Solotronik jam partoprenis en la pasinta ARKONES; nun li ripetas prezentante jam la projekton tute finitan. Tiu projekto estis prezentita dum la Universala Kongreso en Kopenhago en salono Zamenhof. Kiel ĉiam, li ricevis gravajn kritikojn pozitivajn kaj negativajn. Krome kun la kutima jam bojkoto de iuj, kiuj lau opinio de Solo ne volas evoluigi la Esperantan kulturon al nova pensmaniero de la 21-a muzika jarcento.

Solotronik en 1997/2000 estis elektita kiel plej interesa artisto inter alternativa muziko en la grava ne Esperantista revuo Future Music, 4 foje. En 2001 en la listo de hispana nacia radio pri tiuspeca muziko. Aperis artikoloj en gravaj ne Esperanistaj jurnaloj kiel El Pais, El Mundo, Opinion, El Faro, La voz de Galizio, longa ktp. En Santiago de Compostela, en loka kaj nacia TV li disvastigas Esperanton amase!

Prelegoj

Peter Baláž

Titolo: E@I – novaĵoj kaj projektoj.

Priskribo: Kio aktuala okazas en organizo “Edukado@Interreto”? Kio grava okazis dum la lasta jaro? Kiaj novaĵoj estas planataj kaj realigataj? Kiaj agadoj estos baldaŭ videblaj al la publiko? Venu kaj eksci pri plej freŝaj novaĵoj – eldonaĵoj, retejoj, aranĝoj de E@I.

Titolo: Lingvo-lernado rete (lernu.net , slovake.eu , espa2.eu , Livemocha ktp.).

Priskribo: Ĉu vi lernas/lernis lingvo(j)n pere de interreto? Ĉu vi bone konas projekton lernu.net? Ĉu vi ankaŭ konas aliajn bonajn retejojn por lingvo-lernado? Kiaj estas avantaĝoj kaj malavantaĝoj de reta lernado? Ni esploru kune kelkajn ret-projektojn kaj iliajn diversajn ecojn.

Titolo: Esperanto-literaturo – ĝia pasinteco, nuna stato kaj estonto.

Priskribo: Ĉu vi legas librojn? Kaj ĉu vi legas ankaŭ Esperanto-literaturon? Ĉu ofte? Ĉu multe? Kia estas nuna stato de nia literaturo? Kia estas ĝia estonto? Kian vojon ĝi iru, por ne nur ne malaperi sed vere disflori? Eldonisto kaj libro-ŝatanto invitas vin al komuna diskuto.

Ireneusz Bobrzak

Titolo: Renkontiĝo kun Varsovia Vento.

Priskribo: Ĉu en periodo de la interreta informoj-interŝanĝo plu oni bezonas la Esperantistajn radio-elsendojn. Eblaj direktoj de evoluo surbaze de la nuntempaj eventoj kaj spertoj.

Roman Dobrzyński

Titolo: Japania printempo - Oomoto 2009.

Priskribo: Ĝi estas lia unua filmo amatora, do farita komplete de li mem inkluzive teknikajn procedojn. Per tiu ĉi filmo li debutis en la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 2011, Branĉo Filmo kaj gajnis la unua premion. La filmo prezentas liajn impresojn pri la japana kultur-religia organizaĵo Oomoto akiritajn dum lia duonjara studgastado en ĝia centro en Kameoka kaj en kelkaj aliaj urboj de Japanio.

Ian Fantom

Titolo: Ĉu multkulturismo eblas?

Priskribo: En februaro ĉijare la ĉefministro de la brita gazetaro elkriis "Multkulturismo fiaskis". Ili raportis pri prelego de la brita ĉefministro, en kiu li ligis multkulturismon kun terorismo. Sed de kie venis tiu ideo? Ian Fantom serĉis la fonton kaj evoluon de tiu ideo, kaj komparas siajn proprajn observaĵojn kun tiuj esprimitaj en Londono antaŭ ĝuste cent jaroj ĉe la Unua Universala Kongreso de la Rasoj de Ludoviko Zamenhof.

Katalin Kováts

Titolo: Stelsemantoj en la ora nordo.

Priskribo: Prelego pri ĉi-printempe aperinta libro kaj antaŭa esplorkonferenco pri T. Morariu kaj aliaj Cseh-instruistoj.

Katalin malkaŝos al la publiko la mirindan laboron de la Esperanto-instruistoj kaj la oran epokon de la lingvo kaj movado. Kiel eblis, ke unu sola persono sukcesis instrui Esperanton al pli ol dekmil kursanoj? Kio estis liaflanke la prezo de tia sindediĉo kaj movadumado? Vi povos travivi feliĉegajn, humurplenajn, satirajn kaj tragikajn scenojn el la vivo de Tiberio Morariu.

Titolo: Ni jam estas 500-ope!

Priskribo: Informprelego pri la novtipaj KER-ekzamenoj, ties funkciado kaj sukcesoj en la unuaj 3 jaroj.

Danke al la tradukigo kaj eldono de la KER-libro, ellaborado kaj funkciigo de la KER-baza ekzamensistemo ene de la Esperanto-Movado, Esperanto eniris la Konsilion de Eŭropo, la dokumentoj en la internacia lingvo estas listigita sur la hejmpaĝo de Strasburgo. Kion devus signifi por ni la lingvopolitika sukceso? Kiel eblus plifortigi kaj seriozigi la statuson de Esperanto ĉe la eŭropaj instancoj?

Kontribuis al tio kelkaj modelaj asocioj kaj instancoj, kaj ne pretertaksende inter aliaj 130 brazilanoj (ekstereŭrope), 100 francoj, 34 italoj kaj 29 poloj?

Titolo: RITE kaj novaĵoj de edukado.net.

Priskribo: Instruistoj kaj instruemuloj havos eblon renkontiĝi kun la redaktorino de la porinstruista retejo www.edukado.net. Kadre de la programo eblos ricevi informojn pri la plej novaj servoj kaj kolektoj (Diplomlaboraĵoj, Dosierujo, Filmejo) de la retejo. La unuan fojon eblos vidi detalan statistikan analizon pri la paĝaro kaj ties uzantoj, materialoj. La redaktorino donos ankaŭ uzkonsilojn por la uzantoj.

En la retejo estis lanĉita la Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net, privata entrepreno de Katalin Kováts. La 100-leciona kursaro jam havas 20 kursanojn el 12 landoj.

Kion kaj kiel eblas studi en RITE - pri tio eblos ekscii dum tiu ĉi prelego.

Aleksandro Melnikov

Titolo: Ĉu vi estas normalulo aŭ... Esperantisto? Testeto kun komentetoj.

Priskribo: Prelego pri la komunaj ecoj de "tipaj Esperantistoj" vidpunkte de psikologiaj/personaj trajtoj, idealoj kaj moralaj valoroj, komunaj scioj pri la E-kulturo ktp. Per la mallonga demandaro la preleganto pruvos, ke "tipaj Esperantistoj" vere havas ion komunan sendepende de sia nacieco, lingva kaj kultura aparteno.

Yves Nevelsteen

Titolo: Komputeko – prikomputilaj vortoj en Esperanto.

Priskribo: Komputeko (mallongigo de “Prikomputila terminokolekto”) estas reta projekto de E@I, kiu celas kunigi la pri-komputilajn terminojn de diversaj vortaroj, por plifaciligi la aliron al kaj la komparon inter diversaj vortaroj, kaj tiel stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de (ofte fuŝa formo de) usonangla termino. Ĝi nuntempe estas kvinlingva (Esperante, angle, nederlande kaj germane kaj france), sed celas plivastiĝi al kiel eble plej multaj lingvoj.

La Esperantaj vortaroj kaj vortlistoj, sur kiuj baziĝas la Komputeko, estas la Komputada Leksikono, ReVo, PIV, la Interreta Vortareto de FEL, la Teknika Vortaro Pol-Esperanta, la Pekoteko, la Komputila Vortolisto kaj Nederlanda-Esperanta vortaro. Ĝi ankaŭ konsideras la terminologion uzatan en la Vikipedio.

La iniciatinto de la projekto, Yves Nevelsteen, interalie aliĝis al la Esperantigaj tradukskipoj de OpenOffice.org, Ipernity kaj Drupalo kun la celo disponigi la konkludojn de tiuj ĉi skipoj al pli granda rondo pere de la Komputeko. Momente li preparas ĝisdatigon de la retejo www.komputeko.net kaj novan eldonon de la papera verko, kiu en 2008 elĉerpiĝis ene de duonjaro. Kolektiĝis intertempe pli ol 500 modifoj kaj aldonoj. Yves disponigas listojn de plej ofte uzataj prikomputilaj vortoj al vortaristoj kaj dum renkontiĝoj. Li ankaŭ havas liston de “malfacilaj kazoj”, pri kiu li volonte kun vi diskutas.

Edmond Plutniak

Titolo: Vojaĝo al la UK en Jokohamo per la Transsiberia Trajno.

Priskribo: Edmond kaj Arlette Plutniak invitas vin vojaĝi al la UK de Jokohama per la legenda transsiberia trajno de Moskvo al Vladivostoko kaj plu per ŝipo ĝis Japanio. Dum 55 minutoj, kune kun grupeto de 23 Esperantistoj el 6 landoj, vi kunvivos neforgeseblan aventuron tra grandiozaj urboj kaj pejzaĝoj. Vi ankaŭ spertos la kortuŝan gastamecon de rusaj kaj japanaj Esperantistoj. Certe kelkaj inter vi estos fascinitaj, kaj revos entrajniĝi por travivi similan vojaĝon okaze de la venontjara UK en Vjetnamio !

Barbara Pietrzak

Titolo: Podkasto, Pola retRadio, parola kulturo de Esperanto.

Priskribo: Kvankam podkasto signifas sole la interretan programon ricevi la son-/videodokumentoj en la Interreto, kelkfoje en ĝenerala uzo - aparte en la E-komunumo - podkasto estas komprenata kiel radia programo.

Ĉu ĉiu sondokumento liverata kiel podkasto povas esti konsiderita kiel la radia elsendo? Sendube ne, ĉiu tamen E-sondokumento aperanta en la reto devas esti konsiderita laŭ la vidpunkto de la parola kulturo de Esperanto.

Apartan rolon rilate al la parola kulturo de la E-komunumo ludis klasikaj radioelsendoj produktataj de diversŝtataj publikaj radiostacioj. Inter ili apartan ĉapitron en la historio de la E-radiofonio perskribis E-Redakcio de Pola Radio elsendante ĉiutage E-programojn en preskaŭ 52-jara historio de sia funkciado. Kiel tiujn tradiciojn daŭrigas Pola retRadio? Ĉu temas pri la daŭripova projekto?

Veronika Poór, Rogier Huurman

Titolo: MoJoseco kaj muziko: Muzaiko!

Priskribo: “Muzaiko” estas kunlabora tuttempa, tutesperanta kaj tutvolontula retradio-projekto, kiu elsendas muzikon, novaĵojn, babilaĵajn programerojn kaj reklamojn el Esperantio.

Ekde aprilo 2011, pli kaj pli granda grupo de gejunuloj laboras por realigi tiun ĉi projekton, kaj volas kunlabori kun eĉ pli da entuziasmaj homoj kiuj ŝatas verki, registri, paroli, intervjui... unuvorte: krei.

Do, eksciu pli pri la projekto, partoprenu la prelegon!

Przemysław Wierzbowski

Titolo: Evoluo de la bjalistoka e-movado aktuale kaj perspektivoj.

Priskribo: La Universala Kongreso en 2009 en Bjalistoko estis mejloŝtono por la Esperanto-movado en la naskiĝurbo de Zamenhof. Tiam aperis diversaj projektoj kaj realigoj de ili, esperoj efektivigitaj plene aŭ parte kaj neniam plenumotaj. Ĉiukaze en Bjalistoka Esperanto-Societo okazis sufiĉe multe dum la lastaj du jaroj por preparoli kion ni faras kaj intencas fari.

Russ Williams

Titolo: Lingvaj kartludoj por amuzo kaj lingvolernado.

Priskribo: Lastatempe furoris komerce eldonita kartludo “Dixit” (latina: ŝli diris), ankaŭ en iuj Esperantaj aranĝoj. Unu “rakontisto” diras ion ajn pri sia sekreta karto; tiam aliaj ludantoj elektas el propraj karto unu karton kongruan kun la diraĵo; tiam el la malkaŝitaj karto ĉiuj provas elekti la veran karton de la rakontisto. En alia pli malnova kartludo “Once Upon a Time” (angla; “Iam estis”), homoj kune kreas longan fabelon, inspirite de la karto. Tiaj ludoj ne nur estas amuzaj por ludemuloj sed ankaŭ utilaj parolige por lingvolernado. Jen prezento de kelkaj tiaj parolaj ludoj, kun eblo ludi.

Titolo: Abstraktaj strategiaj ludoj.

Priskribo: Multaj homoj ludas aŭ almenaŭ aŭdis pri ŝako, damludo, goo, ktp, sed estas miloj de aliaj tre diversaj sed malpli vaste konataj ludoj sen hazardo kaj sen kaŝita informo. Ofte ludo kun tre simplaj elegantaj reguloj estas strategie tre profunda. Iuj estas komerce eldonitaj; iuj ludeblas per ordinaraĵoj, kiujn vi probable jam posedas hejme; iuj ludeblas en diversaj retejoj. Jen superrigardo pri tiaj logikaj ludoj, kun eblo ludi kelkajn.

Lu Wunsch-Rolshoven

Titolo: Varbado bezonas ripetadon.

Priskribo: Ĝis nun varbado kaj merkatico ankoraŭ ne estas multe atentataj en Esperantujo - iom surprize por lingvo-komunumo, kiu oficiale deklaras ĉiuloke, ke ĝi volas disvastigi sian lingvon. Unu el la kernaj atentindaj mesaĝoj de la varboscienco estas, ke oni devas ripetadi la varban informon - laŭ ŝerca rimarko almenaŭ tiom longe, ĝis kiam ĝi tedos la varbanton; nur tiam ĝi komencos efiki. Se oni realigas ripetitan varbadon kaj koncentras ĝin al malgranda celgrupo, kiun oni intense kaj ripete informas, oni havas la ŝancon kvinobligi la efikon de la investitaj laboro kaj mono.

Prezentiĝos en la prelego krome la Esperanto-informpiramido kun konsideroj pri la labortempo necesa por po unu kontakto per unuopaj informrimedoj. Tio ebligas elekti informmanierojn kun malalta labortempo por unuopa kontakto. Aldoniĝas rimarkoj pri taŭgaj celgrupoj kaj kiel atingi ilin kadre de varbokampanjo. Videblos ankaŭ kelkaj proponoj de varbsloganoj kaj afiŝoj, pri kiuj bonvenas diskuto de la aŭskultantaro same kiel pri la cetero de la prelego.

Se vi ne trovos la tempon por ĉeesti la prelegon, eble konsideru ĵeti rigardon en la librojn de Jay C. Levinson (Guerilla Marketing) kaj David Ogilvy.

Jefim Zajdman

Titolo: Raul Wallenberg, forgesitaj E-pioniroj kaj sekretaj servoj.

Priskribo: Temas pri la fama sveda Esperanto-pioniro Valdemar Langlet, unua Esperantisto-mondvojaĝanto, redaktoro de la dua gazeto “Lingvo internacia”. En 1944 jaro li iĝis gvidanto de Sveda Ruĝa Kruco en Budapeŝto kaj kun la edzino Nina Borovko, filino de alia fama E-pioniro Nikolaj Borovko, komencis savi milojn da homoj de faŝistoj. Iom poste laŭ lia peto el Svedio estis sendita ĉiele diplomato Raul Wallenberg.

Kiam en 1945 jaro Budapeŝton okupis germanoj kaj komencis amasan mortigon de judoj, Wallenberg kiel diplomato daŭrigis la savadon, sed la geedzoj Langlet faris tion, kaŝante sin, ĉar la germanoj serĉis ilin por mortigi. Kiam la Ruĝa Armeo okupis Budapeŝton, Raul Wallenberg estis forŝtelita al Sovetunio, mortis tie kaj fariĝis heroo. Historiistoj ĝis nun penas ekscii veron pri sorto de Raul Wallenberg, kies KŜC-dosiero ne troviĝis.

Post kiam la geedzoj Langlet revenis al Svedio kaj Valdemar en 1946 verkis libron pri la savagado en Budapeŝto, aperis anonimaj artikoloj kontraŭ li kun celo malgrandigi liajn meritojn kompare kun tiuj de Wallenberg kaj eĉ forgesigi lin. Wallenberg fariĝis heroo, sed geedzoj Langlet restis en ombro de lia gloro.

La geedzoj Langlet estis nomitaj de Israelo “justuloj de la mondo”, en 2002 jaro post apero de svedlingva libro “Forgesitaj herooj” Israelo postmorte nomis ilin “Honoraj civitanoj de Israelo”, sed en Svedio sekretaj servoj ĝis nun prisilentas la veron kaj iliaj nomoj tie plu forgesiĝas.

Felix Zesch

Titolo: Politikaj perspektivoj por Esperanto en la Eŭropa Unio.

Priskribo: Se politikisto venus al vi kaj demandus “Kion volas la Esperanto-asocio de via EU-lando?”, kion vi respondus? Ĉu Esperanton kiel oficialan lingvon de EU, laborlingvon en iu organo, instruatan en lernejoj? La Germana Esperanto-Asocio kreis laborgrupon pri realismaj politikaj postuloj favore al Esperanto, kongruaj al nunaj politikaj kondiĉoj kaj leĝoj. Dum kunsido en septembro 2010 ellaboriĝis la “Traktato de Sonnenberg”, akceptita de la GEA-jarĉefkunveno en junio. Mi ŝatus prezenti ilin kaj ekscii vian opinion pri ili. Kompreneble ni ankaŭ diskutos viajn respondojn al la supra demando.

Aliaj programeroj

- tradicia Miela Vespero,
- prezentiĝo de Esperanto-eldonejoj, gazetoj, radioj kaj aranĝoj,
- libroservo,
- komuna foto de ĉiuj partoprenantoj,
- prezento de la filmo “La universala lingvo” de Sam Green,

“La Universala Lingvo” estas nova dokumenta filmo de Oskar-premia nomumito Sam Green. La 30-minuta filmo kaj spuras la historion de Esperanto kaj estas portreto de la hodiaŭa Esperanto-movado. En ĉi tiu pionira dokumenta filmo pri la lingvo, Green kunplektas intervjuojn kaj portretojn kiujn li filmis ĉe pluraj lastatempaj Universalaj Kongresoj kun trezoro da neniam viditaj arĥivaj bildoj pri Zamenhof kaj la frua Esperanto-movado. La filmo ankaŭ inkluzivas intervjuojn kun Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Arika Okrent kaj multaj aliaj. Esther Schor diras pri la filmo: “Se la testo de universala lingvo estas ĉu ĝi parolas al ni ĉiuj, do la filmo ‘La Universala Lingvo’ sukcesas je plej alta rango”,

- prezento de la filmo “Polaj spuroj” de Rogener Pavinski,

La filmo prezentas la historion de la polaj enmigrintoj, kiuj koloniis la tropikajn arbarojn de la provinco de Misiones, Argentino en la jaroj 40 de la XX-jarmilo. Ĝi baziĝas sur la intervjuoj kun la pioniroj kaj siaj posteuloj, el kies rakonto oni povas lerni pri la vivo post la alveno al la regiono. Interesaj rakontoj el diversaj familioj montras al ni la streboj por pluteni sian identecon kaj tradicion polan, la historion kaj fidon de tiuj, kiuj rekonstruis sian vivon, for de la patrujo,

- Dancejo - gvidas Aleksej Korĵenkov,
- renkontiĝo de Pola ILEI-grupo.

Kun specialaj dankoj al

